# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**



**PLENUMITA 15/09/2022 Sescenta eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

# La numero 600



## Gratulon al la Aŭstraliaj Esperantistoj


### Subtenu ĝin. Jam 600 numeroj. Sendu artikolojn!

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 684,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **156,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio

12-a de septembro 2022 Donas bonan Ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon.

Ĉiun tagon



**La plej bona aĝo por lerni Esperanton**

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). "Por Komencantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Unu el la kvar partoj de propozicio (= frazo) estas la Predikato (= Verba Parto). Kiuj estas la nomoj de la aliaj tri partoj?

2). Kun la necesa Verbo (kun unu el la finaĵoj as, is, os, us, aŭ u), kiu alia speco de vorto povas esti parto de la Predikato (krom ebla Predikativo)?

3). Kiuj du specoj de vorto povas esti la Predikativo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 600.

*Marcel Leereveld*.

# Komentoj pri la artikolo de Marcel Leereveld en AE598

Kara Marcel, ŝtatoj kaj ĝiaj enloĝantoj estas nek familianoj nek infanoj.

La konduto inter civilizitaj ŝtatoj estas, ke oni solvas la problemojn per konferencoj kaj interkonsentoj, ne per militminaco.

Do, la sola akceptebla vojo estas, ke la enloĝantoj de Tajvano per voĉdonado decidu, ĉu ili volas vivi en memstara lando aŭ esti parto de Ĉinujo.

Cetere mi bedaŭras, en AE legi tre unuflankan prezenton de Ĉinujo. La multajn kondamnindajn ecojn ni ne forgesu. Se mi vivus en Tajvano, mi scius, kiel mi voĉdonus. Amike, *Peter Weide*



Mi dankas niajn alilandajn kontribuantojn pro iliaj subtenoj de la novaĵletero. *Roger Springer*

# Ĉu prudento aŭ egoismo?

Mi trafis buson por veturi de la ĉefurbo de Bretonujo, Rennes , ĝis la urbeto , Fougères, kiu fieras pro la plej bone konservita kastelo de la mezepoko en Eŭropo, ĉirkaŭ 40 km oriente de Rennes.

Pro la altaj prezoj de domoj en Rennes, multaj laboristoj preferas loĝi en la ĉirkaŭa kamparo, do en la busoj ĉiam estas multe da pasaĝeroj. Mi atingis la mezan parton de la buso sen trovi sidlokon, ĉar ĉiu metis sur la apudan seĝon ĉu sian malsekan pluvombrelon ĉu sian mansakon kaj nur rigardis sian poŝtelefonon , tute ne zorgante pri kio okazas en la buso. . Mi protestis kaj finfine iu virino forprenis sian mansakon por ke mi sidu apud ŝi . Ĉu tiu konduto estas restaĵo de la pandemio? Tamen neniu surportis maskon. Ĉu tiel montriĝas la memcentrismo de tiuj pasaĝeroj? Eblas observi ke kiam homojn trafas danĝero aŭ malbonaj vivkondiĉoj , senco de solidareco kaj helpemo estas pli forta. Kvankam en la amaskomunikiloj abundas artikoloj pri inflacio, manko de gaso kaj elektro, mankoj en la sansistemo, eduksistemo ktp. , verŝajne la situacio ne estas sufiĉe drama por ke homoj reagu komunume. Tio estas granda kontrasto kun la raportoj de du virinoj, kiujn mi jus legis. Temas pri tagĵurnaloj de pola judino, kiu vivis en Francujo dum la nazia okupado ( *Nenie, kien meti mian kapon)* kaj germanino , kiu travivis la okupadon de la rusoj en Berlino (U*nu virino en Berlino 25an de aprilo- 22an de junio 1945)* . Tiuj raportoj estis tute hazarde retrovitaj . Ili bone priskribas kiel interhelpo ebligis elteni la situacion fizike kaj psikologie.



*Franciska Toubale*

# Universala Esperanto-Asocio

Estimata, saluton!

Ni ŝatus scii ĉu estas eble al vi realiĝi/aliĝi por 2022. Tio multe subtenas nian laboron tutmonde, speciale ĉar donas al ni legitiman forton reprezenti vin kaj esperantistojn en forumoj de UN kaj Unesko. Se jes eblas al vi realiĝi, ni kore invitas vin uzi la retan aliĝilon: https://uea.org/alighoj/alighilo Eventuale konsideru aliĝojn kiel DM aŭ al iniciatoj kiel Societo Zamenhof kaj Alianco 365.

**Se eventuale vi havas malfacilecon, inkl. financan, aliĝi, ne hezitu rekontakti. Ankaŭ se vi** deziras proponi kunlaboron kadre de UEA. Estos plezure diskuti pri tio.

Kore kaj samideane,*Fernando Maia Jr.* **Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

Subtenu la laboron de UEA per membriĝo: https://uea.org/alighoj/alighilo

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). La tri aliaj frazpartoj estas la Subjekto, la Objekto, kaj la Adjektoj.
2). La Infinitivo.
3). Substantivo kaj Adjektivo.

*Marcel Leereveld.*